

Manfred Hausmann,

## La kantistino

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Aŭskultas gastoj senmoveme  
al hela fluto-melodi'.  
Sur la genuon heziteme  
demetas la liuton ŝi.

La fajnajn brovojn ŝi volbigas,  
silentas flutoj ĉie ĉi.  
Nun siajn fingrojn ŝi ondigas,  
dum belan kanton kantas ŝi.

La frunton levas ŝi, plongite  
en sian ludon revas ŝi.  
El la okuloj jen subite  
rompiĝas brilo de ebri'.

Malhelas jam, la gastoj iras,  
revenas iu vir' al ŝi.  
Pri feliĉego sia miras,  
ektimas tamen ŝi kaj li.

*Traduko de la Germana poemo "Die Sangerin" de MANFRED HAUSMANN (\*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-928-1861 (2013-10-04 22:14:08)*